BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

ÑO VIII N.° 12 (96) DICIEMBRE, 1956

JUSTO HOMENAJE

Nunca, como ahora, ha aparecido con tanta magnitud, ante nuestra consideración, la figura del Dr. Zamenhof, insigne iniciador —como modestamente se llamaba a sí mismo— del idioma auxiliar internacional.

La significación filantrópica, moral y científica de su personalidad, nimbada por un acendrado amor a la humanidad y aureolada por una modestia, tanto más meritoria cuanto más gigantesca era, en realidad, su transcendente obra, constituye, cuarenta años después de su muerte, el más valioso pedestal sobre el cual puede erguirse la recia figura del creador del Esperanto.

La dramática importancia de los acontecimientos actuales justifica, cada vez más, la trayectoria de su vida, y legitima todos sus actos y anhelos como los más adecuados para lograr su insaciable sed de paz y justicia etnológica. Nunca creyó Zamenhof que el total triunfo de sus aspiraciones idiomáticas constituyese la panacea para las luchas raciales, pero la historia, antes y después de él, demuestra que sin la premisa de una justicia idiomática y del uso adecuado de un lenguaje neutral, como es el Esperanto, todo esfuerzo para lograr la aproximación y hermandad de los pueblos, resultaría baldío.

Por eso, al conmemorar, el 15 de este mes, el 97° aniversario de su nacimiento, los esperantistas españoles ofrendan a su memoria el homenaje de admiración y respeto, y fidelidad a su humanitaria doctrina, confirmando su firme propósito de laborar para que en España, y en todo el mundo, gracias al Esperanto, impere, por fin, ese estado de fraternal comprensión que él anheló, como imprescindible cláusula para lograr esa Paz que, en estos días, nos ha aparecido tan frágil y tambaleante....

18-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 23 - 28 de Julio de 1956

Adreso de la Organiza Komitato: Costa Rica, 20, bajo A

ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto: S-ro A. Figuerola Auque.
Vicprezidanto: F-ino Visitación Martín Gómez.
Sekretario: S-ro Darío Rodríguez López de Silva.
Vicsekretario: S-ro Florencio Enfedaque Tremps.
Kasisto: S-ro Manuel Martín G[...]mez.
Kalkulisto: S-ro Manuel María Lóp[...] Giménez-Alfaro.
Voĉdonanto: S-ro Julio Pérez Velasc[...]
Voĉdonanto: F-ino Concepción Casa[...] Forcén.

ESPERANTO EN UNIVERSITATA MEDIO

La altaj instancoj de U. E. A. varme rekomendas, al ĉiuj aliĝintaj organizoj, la enigon de Esperanto en universitataj programoj. Unu el la plej interesaj decidoj de la lasta kongreso de H. E. F. estis tia devo, kaj ni ne dubas ke, en ĉiuj universitataj regionoj, la tieaj esperantistoj penas por efektivigi tian interesan rekomendon.

Jam de kelkaj jaroj, Prof. J. Régulo Pérez, nia altvalora samideano, sukcesplene gvidas kursojn en la kanaria Universitato de La Laguna.

Pasintan jaron, nia nelacigebla valencia samideano, D-ro E. Tudela Flores, meritplena aŭtoro de la Hispana-Esperanta Vortaro, kaj trafa gvidanto de pluraj kursoj dum la lastaj jaroj, sukcesis interesigi pri Esperanto, la Dekanon de la Fakultato de Medicino en Valencio, kaj, jen kial, pasintan jaron, Esperanto estis instruata al pluraj studentoj, kaj la bona semo fruktiĝas ĉijare. Plie, decidinte kompletigi la sferon de nia agado, D-ro Tudela, akompanata de D-ro Herrero, vizitis la Direktoron de la Instituto pri Idiomoj, de la valencia Universitato, kaj, poste, la Rektoron mem, kiun vizitis ankaŭ, tiucele, nia ŝatata samideano J. Santiago, de Valencio. Post afabla permeso de tiuj akademiaj aŭtoritatuloj, pasintan Novembron komenciĝis kurso de Esperanto, en la antaŭe citita Instituto pri Idiomoj de la Universitato. Malgraŭ la troa rapido por starigi la instruadon, D-ro Herrero, gvidanto de la kurso, povis sin turni, dum la unua klaso, al kelkaj dekduoj da lernantoj, komencante per tiuj vort[...] «Ĉiuj, trapasante la klostran kortegon, p[...] veni en ĉi tiun *Aŭla Magna*, povis adm[...] la belan statuon de Ludoviko Vives, [...] valencia klerulo kaj eminenta filozofo. [...] li povis, dum la fruaj jaroj de la dekse[...] jarcento, instrui en Anglujo, Francujo k[...] Belgujo, krom en Hispanujo, tio est[...] dank' al la latina lingvo, kiu estis, tia[...] la internacia lingvo. Tamen, en nia a[...] nivela dudeka jarcento, kiam forpasin[...] Fleming kaj vivanta Domagk prelegis [...] fremdaj universitatoj, nur eta malplimul[...] povis kompreni ilin. Ni volas, starigan[...] ĉi tiun kurson de Esperanto, helpi al [...] forigo de tiu hontiga situacio». Ĉe la fi[...] de la parolado, dum kiu li klarigis [...] ĉefajn trajtojn de la lingvo, de la int[...]nacia kaj nacia organizaĵoj, kaj de [...] homaramaj celoj de nia movado, mult[...] gejunuloj enskribiĝis en la kurso, k[...] funkcias sukcesplene kaj kun ĉies ent[...]ziasmo.

Dume, en la Medicina Fakultato, D-[...] Tudela gvidas, trafe, kurson por student[...] kiel pasintan jaron, kaj, plie, alian p[...] flegistinoj, kiuj memvole petis, amase, es[...] instruataj pri Esperanto.

Ni scias ke, en aliaj Universitatoj, o[...] penas interesigi la tieajn instancojn p[...] nia afero. Ni esperas ke oni sukcesos, ĉ[...] tio signifos, gravan venkon en nia ĉi[...]taga batalo por la internacia lingvo.

P. Delo.

LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

FORIGENDA MALSANO

De la unuaj momentoj, la esperantistoj, por varbi adeptojn, intencis, antaŭ ĉio, in-
ɔrmi ilin pri la granda facileco de Esperanto, pro ĝia simpla kaj logika konstruo,
aj tiucele, oni aranĝis la tiel nomatajn «rapidkursojn»; kaj «Esperanto en 10 lecionoj»
ıriĝis devizo por la propagando kaj instruado de la varbitoj. Kaj tial ke la esperantistoj
iom emfazis pri la facileco de Esperanto, multaj personoj komencis lerni ĝin, sed kiom
l ili finis la studadon? Kie estas la miloj kaj miloj da komencintoj? Jam post la unuaj
ɔcionoj, la plimulto el ili forlasis la aferon kaj fariĝis indiferentuloj aŭ kontraŭuloj
ilate nian movadon, kaj laŭ suprajaj kaj malĝustaj vidpunktoj ili prijuĝas nian lingvon.
ıliaj komencintoj, bedaŭrinde malmultaj, fariĝis esperantistoj, malgraŭ la maldikaj
ɔrnolibroj kaj «rapidkursoj», ĉar ili konstante legis kaj legis esperantaĵojn, korespon-
adis, konversaciis ktp. Mi ne dubas, ke ekzistas geniuloj, kiuj per la plej maldikaj
ɔrnolibroj kaj eble sen kursgvidantoj fariĝis elstaraj esperantistoj, konsistigantaj la
liton de la esperantistaro, kaj pro tio ili malaprobas ampleksajn lernolibrojn, vor-
ırojn, longdaŭrajn kursojn k. c. Por ili ĉio sufiĉas kaj eĉ superfluas.

Ne, tute ne. Tiaj propagandoj kaj instrumetodoj permesataj dum la infanaĝo de
ɛsperanto, ĉar la ĉefa celo estis konatigi la publikon kun nia lingvo kaj interesigi
iel eble plej vastajn rondojn, mi modeste opinias, ke hodiaŭ ne estas konsilindaj.
Ii ne povas kredi ke la verkistoj de tiaj maldikaj lernolibroj trompis konscie la varbi-
ɔjn, tute ne, mi nur deziras atentigi pri tio, ke nuntempe kiam oficialaj institucioj
aj registaroj sin okupas pri la solvo de la problemo de internacia helplingvo, pere de
ɛsperanto, tiuj libroj ne sufiĉas, ĉar estas nepre necese, ke la kursgvidantoj estu kiel
ɔle instruitaj, spertaj kaj kleraj, kaj povu instrui la varbotojn kaj pruvi ĉiam kaj ĉie,
e Esperanto kiel helpanta lingvo utilas same kiel ia ajn nacia lingvo en la plej diversaj
ıkoj de la homa scio. Esperanto jam pasigis sian infanaĝon kaj, plenaĝa, bezonas
randan nombron da instruantoj. Tiurilate, mi aplaŭdas la entreprenon de H. E. F. pri
kzameno kaj diplomigo de lernintoj. Estas eble, ke en neatendita momento Esperanto
ıiros solene en Lernejojn, Liceojn, Universitatojn k. s., kaj H. E. F. devas krei unu-
radajn kaj superajn diplomitojn, kiuj en la unuaj momentoj povos agi kiel instruistoj,
is kiam fakuloj esperantiĝos.

Ĉu utopia revo de maljunulo? Hodiaŭ jes, sed ne forgesu, ke hodiaŭ revo, eble estos
ıorgaŭ realo.—*E. Tudela.*

NIA PLEJ URĜA LABORO

Se ni, esperantistoj, estas konvinkitaj, ke Esperanto estas ideo, por kiu ni devas streĉe
eni kaj por kies triumfo ankoraŭ ni devos labori multan tempon, ni facile komprenos, ke
ia konstanta devo estas varbi novajn adeptojn, kiuj daŭrigu nian laboron, kiam ni pro
ıaljuniĝo estos nekapablaj agi kun la energio, kiun tiu ideo postulas. Ĉar ni devas ne
ɔrlasi tian laboron ĝis kiam nia lingvo estos oficiale akceptita en universitatoj kaj
ltlernejoj de la tuta mondo.

Kaj jen, unu demando stariĝas antaŭ ni: Kiu daŭrigos tian laboron? La respondo elfluas
ıpide el la buŝo de ĉiu esperantisto: LA JUNULARO! Sed ni devas sincere agnoski, ke
ı nia lando ne ekzistas multaj junaj esperantistoj. Kial? Ĉar la malnovaj esperantistoj,
ıiaopinie, ne pripensis la estontecon de nia ideo kaj pro tio ili ne agis laŭ la postuloj de la
ɔerto. Estas, do, necese, altiri al ni niajn amikojn, la gejunulojn, pere de senĉesa laboro de
isvastigado de nia ideo, ĉe iliaj laborejoj kaj sportejoj, aŭ en familiaj kunvenoj, ĉe la
ıniversitatoj kaj ĉiaj lernejoj; tio estas, ĉiuloke kaj ĉiuhore. Tia estas nia unua farenda
ıboro por enradikigi ĉe la gejunuloj, por ĉiam, la ideo pri nia movado, kaj farante tie
i povos atendi, trankvile pro la plenumita devo, la momenton de la ĉiama ripozo.

Se ni ne faras tiel, ni ne estas indaj je la penoj de niaj antaŭloj kaj ne meritas ke
ıiaj posteuloj rememoru nin.—*Severiano Arnáiz.*

NOVAJ LIBROJ

VOCABULARIO ESPAÑOL - ESPERANTO, Dr. Ernesto Tudela Flores. Prólogo del Doctor Rafael Herrero Arroyo.—Valencia, Imprenta Peris, 1956. — 14 x 21 cm., 232 páginas a 2 columnas. Precio: 65 pesetas.

Al parecer el Dr. Tudela ha sido de opinión que lo mejor es enemigo de lo bueno y por ello no ha esperado más para lanzar su *Vocabulario Español-Esperanto*. Los que, como yo, han enseñado esperanto a personas de lengua española durante los últimos veinte años, han podido comprobar el gran vacío de diccionarios en que nos hallábamos. Nuestra Federación se hizo eco de tal necesidad, y el Congreso de Valencia de 1952 estableció una Comisión de expertos con el fin de llevar a cabo la tarea de dotar a los hispanohablantes de un diccionario español-esperanto verdaderamente responsable. Estudiar esperanto en España y Latinoamérica (con excepción de Brasil, que cuenta con excelentes manuales y diccionarios), habida cuenta de la penuria de medios auxiliares, ha sido en estos últimos años casi un heroísmo.

Por ello es muy de agradecer la labor del Dr. Tudela, cuyos resultados comentamos. Todo es perfectible, y también el trabajo de nuestro samideano, como él mismo modestamente reconoce. Pero también es sabido que los diccionarios, salvo casos excepcionales, comienzan a ser buenos sólo a partir de la 2.ª o 3.ª edición reelaboradas.

Desde ahora nuestros estudiantes de la Lengua Internacional pueden orientarse acerca de las equivalencias de los términos castellanos más usuales en los periódicos y en la conversación, como ***antibiótico, autogiro, aspirina, baloncesto, celofán, dictáfono, escandallo, estraperlo*** (sería mejor esta forma que su verbo, solo consignado en el *Vocabulario*, porque es la original y por ser más común), ***fútbol, horchata, nilón*** (mejor que la impresa ***nylón***, híbrida y extraña a nuestra ortografía), ***termo, yogurt***, etc., etc. Y aunque faltan muchas dicciones comunes, por ejemplo ***correveidile, desenvoltura, felonía*** (está ***felón***, pero sin matización idiomática), ***flit, nacionalización*** (= ***ŝtatigo***, no = ***naciigo***, que es cosa m distinta), ***rebeca***, etc., y en otras numero se escapa bastante de su nimbo semánti v. gr. ***gañán*** es «otra cosa» en espai además del vasto y vago ***kamplabori*** que la glosa; ***lindo*** y ***guapo*** no se cubr con ***bela*** y las demás voces aducid como tampoco ***azotea, gamberro, fasti*** (no está sino el verbo ***fastidiar)***, etc., c todo, el *Vocabulario* del Dr. Tudela es servicio positivo a nuestro movimier entre los hispanohablantes.

Si algo hallo criticable negativamer es la mano demasiado ancha del autor cuanto a la admisión de neologismos. H exceso de ellos en las glosas y a vec incluso distintos para un mismo concep *Chumbera* y *nopal* son dos nombres d mismo vegetal y el primero aparece igu a ***opuntio*** y el segundo a ***nopalo***. Adem un principiante o un samideano po experto puede usar ***alkaŭedo, haspe kekso, kapikuo/palindromo*** (¡sólo a he nistas avisados será asequible este bi extraño huésped!), ***norio*** y tantos otr términos semejantes como equivalent respectivos de ***alcahuete, devanadera, g lleta, capicúa, noria...*** Y yo me pregun ¿quién lo entendería en Checoeslovaqu Dinamarca, Finlandia, Japón, Yugos via...? A mi manera de ver no es proc dente —ni prudente— lastrar un voc bulario elemental, destinado a la masa d pueblo, con material tan extraño y pr penso al descamino y naufragio de comprensión. Otra cosa sería si se trata de un vocabulario esperanto-español, que el usuario necesita saber el significa de los términos con que tope. Pero u glosario español-esperanto, según yo entiendo, debe ser, fundamentalmente, u instrumento NORMATIVO, antes q un cajón de sastre.

Otro aspecto muy formativo sería de añadir, siempre y consecuentemen junto a los neologismos, si se insiste e ponerlos, el compuesto usual o tradici nal en esperanto, que de este modo servir de glosa al término nuevo. Si con bu criterio junto a ***alkaŭedo*** está ***fisvatis***

acaso fuera más claro *amorperisto*); si con *ekso* se aparejan las voces oficiales *kra-eno* y *kringo*; si al lado de *navedo* viene *litbobeno*, etc., ¿por qué junto a *haspelo*, *apikuo* / *palindromo*, *kodako*, *norio* y casos emejantes no se dan respectivamente *obenilo* / *bobenkadro* / *bobenframo*, *simetria umero*, *fotilo*, *akvolevilo* / *radĉerpilo*, etc.? Mucho se lo habrían agradecido todos, specialmente los que, como yo, prefieren xplotar las virtualidades del esperanto, ntes que valerse del expedito procedimiento de anglicarlo en Londres, galiarlo en París, eslavizarlo en Moscú o ispanizarlo en Valencia.

Pero porque *kritiki estas facile, fari malfacile*; porque *nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras*, y porque *kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas*, termino agradeciendo, una vez más, al Dr. Tudela lo que HA HECHO y con votos sinceros porque pronto una 2.ª edición, sin las premuras que afectaron a la 1.ª, mejore lo que en sí ya es digno de encomio.

J. Régulo Pérez

LA INFANA RASO, Poemo en 25 ĉapitroj, originale verkita en Esperanto de William Auld. Antaŭparolo de John Francis. Kun 5 dekoracioj de pentristo P. Lavalle kaj arta kovrilo de J. Hartley. Eldono «Stafeto», La Laguna, Kanariaj Insuloj.

Jen impona originale Esperanta Poemo. La INFANA RASO estas la nuna homaro. «Bakterioj de l'Universo» (ĉap. 22), kies tasko estas «labori por manĝi kaj por labori manĝi» (ĉap. 17). Estos necesaj «milmiliono da homoj por krei unu Homon» (ĉap. 5) ĉar «de l'homo de l'futuro ni estas nur simptomo», «ni vivas por vivigi»... La homoj naskiĝas, blinde vivas, generas, batalas kaj mortas, nura ĉenero inter estinto kaj estonto. El kie kaj kien?—Malfacila respondo por nekredanto. Tial «Kiu proklamos solvon mensogos».

Tiun idearon, jam ĝerme troveblan en la unua ĉapitro (premiita en Literatura Konkurso) la aŭtoro disvolvas tra 25 ĉapitroj, mi prefere nomu kantoj, tre malsimilaj funde, forme kaj longe, ĉar kelkaj el ili estas pli ol 100 versaj kaj unu konsistas nur el kvin vortoj, unuigitaj nur per la subtila kaŝa fadeno de tia skeptika mondkoncepto; kaj li ĝin disvolvas per harditaj, krudaj, malprudaj esprimoj, nomante ĉion per ĝia nomo. Mi pensas ke neniu Esperanta verkisto atingis ĝis nun tiel liberan stilon. Se la V-a kanto ŝokos preskaŭ ĉiun leganton pro sia malkaŝa esprimo, la II-a, la XIII-a kaj aliaj ofendos ne nur la katolikojn, sed ankaŭ la aliajn religiulojn. Mi memoras okazintaĵon de komence de la XX-a jarcento. Estis dum la Bura milito. Prezidanto Krügger estis vizitonta Parizon kaj oni timis pro la diversaj opinioj: la Bura kaŭzo ja havis multajn simpatiantojn: sed la aŭtoritatuloj ankaŭ ne volis ofendi la Anglojn. Tion oni solvis facile. Oni permesos ĉiuspecajn vivu'ojn! kaj oni malpermesos kontraŭajn vortojn: mortu! for! k. t. p. Ĉiu povis esprimi sian senton kaj neniu ofendiĝis. Same, neniu ofendiĝus se li legas himnon al Mahometo aŭ al Budao aŭ al Nenio, kaj ofendiĝas se li legas mokan aludon al sia kredo.

Sed Vi diros ke, kiu havas kredon, deziras ne nur laŭdi la sian sed batali la aliajn. Jes, li deziras kaj li pravas; sed por tio pli bone decas la prozo, la polemikaj verkoj, ne la Poezio, kiu, laŭ asertis Cervantes, estas «Milda kaj junaĝa virgulino».

Pardonu. Mi devojiris el mia tasko, kiu estas nur cenzuri la literaturan, ne la filozofan parton. En tiu aspekto, mi nur povas laŭdi. Estas konate ke Auld estas unuaranga poeto, ne espero sed realo de nia poezio. Lia vortaro estas ampleksa kaj trafa, li verkas perfekte ĉizitajn strofojn, ritme kaj rime, kiel en la kantoj 1, 2, 3, 4, 7 k. t. p. Li imitas sukcese la latinan piedan versfaradon (XX-a kanto), kies solenaj heksametroj povus certe aparteni al Virgilius—aŭ al Horatius aŭ al Ovidius—kaj eĉ provas la *paralelan vesfaradon* orientan. Li malobeas alie ĉiun regulon kaj verkas modernstile, kiel en la IX-a, XIII-a, XIV-a... kantoj). Metriko ne havas por li sekretojn; lingvo ankaŭ ne: Vidu la fuŝajn vortojn de la IV-a apitro, kie ĉiu kvazaŭ eraro kaŝas satirikan, vere vipan sencon.

Certe, ĝi ne estas verko por komencantoj, pro sia riĉa lingvo, nek por etuloj, pro la forta esprimo; sed *ĉiuflanke plenaĝa* homo trovos en ĝi profundajn pensojn kaj altan belon.

La materia parto, inkluzive la gravurajojn, estas ankaŭ laŭde menciinda.

A. Núñez Dubús.

DIVERSAĴOJ

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 15-a de Januaro.

Ni ricevis korektan solvon de la enigmo n.° 41 el jenaj samideanoj: V. Monsalve, E. Padrao, R. Bastardas, P. Naranjo, R. Ayala, E. Calvet, S. Roca Rodó kaj M. Fernández. Atingis 10 poentojn samideano E. Padrao, do ni sendas al li la premion.

SOLVO DE LA ENIGMO N.° 41


Horizontale: 2 Peruk. 3 Pil. Rig. 4 Ulemo. 5 Graki. Omega. 6 sineheR. 7 Palp. Cico. 8 Intajlo. 9 Perei. Rajpo. 10 Spion. 11 Kot. Ted. 12 Aroki.

Vertikale: 2 Grajp. 3 Por. Esk. 4 Aspir. 5 Pluki. Nesta. 6 Linotip. 7 Arde. iroS. 8 Mohajro. 9 Krome. Lanti. 10 Ercoj. 11 Gag. Pad. 12 Akcio.

ENIGMO N.° 44

Krucvorta enigmo, de J. Devis.

Malsupra figuro.



Horizontale: 2 (Inv) Densaj haroj de maldikaj kunkreskantaj aĵoj. 3 Prepozicio. Frakcio. 4 (Rad) Alte taksi ies spiritan valoron. 5 (Rad) Malvarmo. (Rad) Infera ŝtono. 6 Diagnoze frapeti. 7 Garde dejori sur ŝipo. (Rad) Ekzistanta k kontrolebla. 8 Lertaj rimedoj celantaj sukceson. 9 (Inv) Propono pri trinko. (Rad) Migdalmielaĵo. 10 M moderna spado. 11 (Rad) Fatalo. (Ra Kavo en io. 12 Hazarde renkontata.

Vertikale: 2 Eta kvanto da akvo r tanta en kavaĵo. 3 Prepozicio. (Ra Ŝtoneca tavolo ne penetrebla de la veg taĵaj radikoj. 4 (Inv) Trunketo. (Inv) Mallongaj literaturaj verkoj. Ĉe arterio. 6 Alĝustigita. 7 (Inv) I testa malsano. Antaŭhistoria. 8 Orna per lumiloj. 9 (Rad) Veg. kun manĝ blaj ruĝaj fruktoj. Mallonga. 10 (Ra Boateto. 11 Nedifinita pronomo. Labo 12 (Rad) Ekkuri en sporta konkuro.

RIDU!

Kliento: «Ĉu vi havas efikan kur cilon kontraŭ nazkataro?»

Apotekisto: «Tutcerte, sinjoro, mi kon las al vi la efikegajn pilolojn de D-ro Fuŝo

Kliento: «Ho, ne, dankon! Mi est Doktoro Fuŝo!»

—

Polikarpo, tre konata pro sia virinem suferis pri nekuracebla maldekstrema ko tordiĝo. Foje, li konsultis lertan speci liston. Unu semajnon poste, li estis tu resanigita. Demandite, li klarigis al amik la metodon.

«Ne malsukcesebla! La fripono sidig min kontraŭ fenestro kaj, en tute dekst flanko estis balkono kie aperis, de temp al tempo, allogegaj belulinoj! Imagu...

—

Malsanulo: «Do, kion mi devas fa Doktoro?»

Doktoro: «Testamenti!»

—

Bestkuracisto: «Sinjorino, vi maltraf mi nur estas bestkuracisto. Kiu adres vin al mi?»

Pacientino: «Mia bofilo, Sinjoro!»

☆ LA LERNEJO

LERNU TRADUKANTE

Inter la sendintoj de korektaj tradukoj ni distribuos premiojn, laŭ samaj kondiĉoj kiel por la enigmoj.

Ni ricevis korektajn tradukojn de la tasko de Julio el jenaj samideanoj: A. Núñez, V. Hernández, I. Luis, E. Pons, R. Manau, A. Escamilla, V. Monsalve, S. Roca Rodó, J. Saladrigas, M. Fernández kaj E. E. Yelland.

Jen unu el la ricevitaj tradukoj:

La domo kie la familio Hurtado loĝis, apartenis al markizo, kiun S-ro Petro estis koninta en la lernejo. S-ro Petro administris ĝin, enspezis la lupagojn kaj parolis multe kaj entuziasme pri la markizo kaj liaj bienoj, kio al lia filo ŝajnis ekstreme plebeca. La familio Hurtado estis en rilato kun gravaj personoj; S-ro Petro, malgraŭ siaj arbitrajoj kaj hejma despotismo, estis tre afabla al la fremdaj personoj kaj sciis konservi la utilajn amikojn. Hurtado konis tiujn ĉiujn najbarojn kaj estis tre kompleza al ili. Li dediĉis al la najbaroj multajn ĝentilajojn, escepte al tiuj de la mansardoj, kiujn li malamis. Laŭ lia teorio pri la mono ekvivalenta al merito, alportita al la praktiko, malriĉulo devis esti sinonimo de mizerulo. S-ro Petro, senpense, estis viro laŭ la malnovaj tempoj; suspekto pri tio, ke laboristo pretendas konsideri sin kiel personon, aŭ pri tio, ke virino volas esti sendependa, ofendis lin kiel insulto.

Jen por nova tasko, peco de la romano «En busca del Gran Kan», de Vicente Blasco Ibáñez:

Ocho años antes, el doctor Acosta había reanudado los estudios geográficos de su primera juventud, procurando realizar otros nuevos para responder a las consultas que le hacían, y además por satisfacción de su curiosidad, excitada dentro del nuevo ambiente en que parecían vivir todos los doctos de su época. Empezaban a preocuparse los españoles de los descubrimientos de nuevas tierras, al ver los avances del vecino Portugal. Este país, casi siempre enemigo —a pesar de los enlaces matrimoniales entre las dos monarquías—, al sentirse aislado de la vida europea, por el obstáculo de Castilla situada a sus espaldas, buscaba una expansión en el océano. La España recién unificada tenía también costas oceánicas y deseaba llevar a ellas las iniciativas de sus marinos, que hasta entonces se habían desarrollado especialmente en el Mediterráneo.

FEDERACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Con el número de Noviembre de nuestro Boletín se distribuyeron entre los socios de esta Federación unas hojas amarillas «Pro Ayuda Económica», con el ruego de que todas aquellas personas que pudieran hacerlo, nos devolvieran cumplimentado el volante que figuraba al pié de dichas hojas. Sentimos que nuestro llamamiento haya despertado hasta ahora un eco tan pobre como el representado por las siete únicas adhesiones que de fuera de Valencia se han recibido. Esto sinceramente hemos de confesar que es francamente descorazonador; no obstante todavía no hemos perdido la esperanza y la confianza de que todos aquellos que crean que la Federación merece tal ayuda y *puedan hacerlo,* se la prestarán.

Esperamos que el número de adhesiones que recibamos en los próximos días será digno exponente del consciente sentido de responsabilidad que siempre han poseído los esperantistas hispanos.

LA JUNTA DIRECTIVA.

NI DEZIRAS AL NIAJ LEGANTOJ FELIĈAJN KRISTNASKON KAJ NOVJARON

VOCABULARIO ESPAÑOL - ESPERANTO

del Doctor E. Tudela Flores

22.000 palabras

Precio: 65 pesetas

LIBROSERVO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Pelayo 7 — Valencia

Del éxito de venta de este vocabulario depende la pronta edición del Esperanto-Español, actualmente en preparación.

LA MALPRUDENTA SCIVOLULO

interesa novelo de Cervantes en klara, bela kaj fidela traduko de

LUIS HERNANDEZ

68 paĝoj 20 x 14 cm. Belaj ilustroj kaj vinjetoj. Arta kvinkolora surkovrilo. 20 pesetoj.

Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio

Pronto se pondrá a la venta

LERNOLIBRO DE ESPERANTO

de L. Mimó

«...una gramática moderna de Esperanto, completa y pedagógica. Los maestros y alumnos de habla castellana tendrán en él un buen libro de aclaraciones y prácticas de la lengua internacional. Realmente, no es un «lernolibro» más, sino uno excepcional».

D. Dalmau

(Miembro de la Academia de Esperanto)

ATENTU!

Esperanto-Kalendaro 1957, inda pendi sur la muro de oficejo, manĝoĉambro aŭ saloneto. La eldonantoj penas ĉiujare plibonigi ĝin. Akirebla ĉe «La Verda Kolombejo», Ciaño Sta. Ana, Oviedo, Hispanujo. Prezo: 6 pesetoj aŭ 2 int. respondk.

PARA NAVIDAD Y AÑO NUEVO

Juegos de cinco tarjetas de felicitación, se venden al precio de 2 ptas. cada juego. Encargos a Libro-Servo, Pelayo núm. 7, Valencia.

DIA DEL LIBRO ESPERANTISTA

Como es sabido, el dia 15 de Diciembre, fecha del nacimiento del Dr. Zamenhof, es también el día del libro esperantista. Espera vuestras órdenes el servicio de libros de la Federación: Libro-Servo, Pelayo 7, Valencia.

BOLETIN
de la
FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOL

BULTENO
DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio
Str. Pelayo, 7, 1.ª
VALENCIA

Kotizoj de la Federacio
Simpla membro: 15 pesetojn jare
Membro-abonanto: 50 pesetojn jare
Membro-subtenanto: 80 pesetojn jare
La membroj de la du lastaj kategorioj ricevas Bultenon. La subtenantoj ricevas du ekzempleroj
Eksterlanda abono al la Bulteno: 50 pesetojn ja

Monsendojn adresu al:
S-ro Ernesto Hurtado
Str. Pelayo, 7, 1.ª - VALENCIA

DONACOJ AL NIA BULTEN

Antaŭa sumo. . .	**2.637**	**pes**
L. Mimó, Sabadell	**50**	**»**
F. Bayo, Bilbao	**10**	**»**
A. Pastor, »	**35**	**»**
P. Naranjo, Jerez de la Frontera.	**10**	**»**
M. Buscató, Barcelona . . .	**15**	**»**
V. Benet, Alboraya	**10**	**»**
P. Moreno, Madrid	**50**	**»**
C. C., X.	**40**	**»**
R. Herrero, Valencia	**10**	**»**
J. J. Forné, »	**5**	**»**
J. Bosch, »	**10**	**»**
Entute. . . .	**2.882**	**pese**

Sinceran dankon por via respondo nia alvoko!

Para conocimiento público

El 19 de Septiembre de 1955 y con fin de que pudiera explicar un curso en «Centro Cultural Leridano», de Barcelo fueron remitidas diez gramáticas a d Francisco J. Arrán Vicens, con domici en la calle Joaquín Costa, 56, 1.º, 2.ª, aquella ciudad. A pesar de varios reque mientos hechos para que dicho señor liq dara su deuda y un último aviso, adv tiendo se haría público el hecho, el señ Arrán continúa debiendo el importe d material que él mismo solicitó. Por el nos vemos obligados a publicar esta i formación.

Libroservo de Hispana Esperanto-Federa

PERIS-G. VÍA M. TURIA, 23 VALENCIA

Federación Esperantista Española
Pelayo, núm. 7
VALENCIA

Diciembre 1956.

A principio de 1957 corresponde elegir nueva Junta Directiva, de acuerdo con nuestros estatutos. Hemos confeccionado una lista de candidatos, por la que nuestros consocios observarán que algunos miembros van a la reelección y otros son sustituidos. Rogamos a todos los socios de la Federación, que devuelvan firmado el boletín al pié de esta circular. Ahora bien, debemos hacer una aclaración muy importante para evitar una falsa interpretación. Nosotros proponemos esta lista por considerar que las personas que figuran en ella han demostrado con su actividad y su entusiasmo que harán o seguirán haciendo un buen servicio a la Federación, pero ello no significa coacción alguna; todos los electores tienen el derecho de hacer las supresiones y sustituciones que estimen convenientes. Lo que sí rogamos es que se nos devuelva el boletín firmado, a la mayor brevedad posible.

LA JUNTA DIRECTIVA

Elección de nueva Junta Directiva de la Federación Esperantista Española

Presidente:	D. Rafael Herrero Arroyo	—	Valencia
Vicepresidente:	D. Mariano Solá Montserrat	—	Tarrasa
Secretario:	D. José Guzmán Guzmán	—	Valencia
Vicesecretario:	D. Pedro Marqueta Roy	—	Zaragoza
Tesorero:	D. Ernesto Guillem Tarín	—	Valencia
Vocal 1.º:	D. Juan Bosch Fornals	—	Valencia
Vocal 2.º:	D. Darío Rodríguez López de Silva	—	Madrid
Vocal 3.º:	D. Luis de Otaola y Faón	—	Bilbao
Vocal 4.º:	D. Oscar Yáñez Miranda	—	Las Palmas

Población y fecha ....

FIRMA,